

# TEA-BULTENO

4<sup>a</sup> JARO

SEPTEMBRO 2001




NUMERO 7



## AGENDO



## Vortoj de la Redakcio

- 1 S
- 2 D
- 3 L
- 4 M Prepare al ekskurso sur *Monte Forno*
- 5 M
- 6 Ĵ
- 7 V Gazetara Trafoliumado
- 8 S
- 9 D **Festo de Amikeco (vd. je 4<sup>a</sup> paĝo)**
- 10 L
- 11 M Kartluda vespero 
- 12 M
- 13 Ĵ
- 14 V Gasto ĉe ni
- 15 S
- 16 D
- 17 L
- 18 M Ni parolu Esperante! 
- 19 M
- 20 Ĵ
- 21 V Ses tagoj de kreado (IKU-prelego)
- 22 S
- 23 D
- 24 L
- 25 M Ni parolu Esperante! 
- 26 M
- 27 Ĵ
- 28 V Niaj planoj pri estonta aktiveco
- 29 S
- 30 D

### Kara Leganto!

En la junia numero de TEA-BULTENO estis anoncite, ke dum monatoj de julio kaj aŭgusto la asocia komunikilo ne estos redaktata pro prikongresa laborado kaj ke oni ree ricevos ĝin en septembro.

Jen, la promeso farita estas nun plenumita, ĉar ĝin vi elprenis el via poŝtkesteto akurate komence de ĉi monato. En la junia Bulteno, krome mi skribis, ke ĝi reaperos "se oni postvivos la kongreson"... La fakto ke nun vi estas leganta ĉi tiujn vortojn, certigas vin pri nia bonfarto kaj sukcesa eltenado de ĉiuj kongresaj travivaĵoj.

Nepras nun kelkaj vortoj pri la 70<sup>a</sup> Itala Kongreso de Esperanto, kvankam ili ne sufiĉas por priskribi kaj la disvolviĝon de la kunveno kaj la malantaŭ-kulisajn laborojn/problemojn; fine eble mi, unu el la organizantoj, tute ne estas la plej taŭga persono por prijuĝi ĝin tute objektivite kaj ne influate de propraj spertoj kaj emocioj. Tamen... tamen permesu, ke mi eldiru kelkajn miajn impresojn.

Unue, pri aliĝantaro: 333 esperantistoj el 24 diversaj landoj! Venis samideanoj el Afriko, Amerikoj, Azio kaj kompreneble el Eŭropo. Tiu multnombra partopreno de eksterlandanoj ŝuldiĝas ĉefe al la fakto, ke nia kongreso alcele estis organizita tuj post la 86<sup>a</sup> UK en Zagrebo: fakte multaj kaptis ĉi tiun ŝancon por plilongigi sian feriadon, vizitante nian nacian renkontiĝon. Rekorda do estis kaj nombro de partoprenantaro kaj nombro de ne-itala esperantistaro.

Due, indas tuj mencii la inaŭguron: en la belega kaj vasta salono *Saturnia*, alrigardanta la bluan de la maro kaj la verdon de la montetoj ĉirkaŭantaj nian urbon, oni aŭdis la oficialajn malfermajn paroladojn kaj salutvortojn de podianoj kaj reprezentantoj diverskontinentaj, por poste neatendite mergiĝi en mezepokan etoson, dum la bonveniga ceremonio de la 13 TRIESTAJ FAMILIOJ. Ĉefe por ni triestanoj temis pri tre emociigaj kaj signifoplenaj momentoj.

Due, pri programo ĉu kongreseja ĉu eksterkongreseja: laŭnordire (ĉar organizantoj kaj helpantoj tute ne havis eblon ĉeesti iun ajn prelegon aŭ kunsidon) ĉio estis ege interesa kaj altnivela. Tio bone kompreneblas, se simple oni legas en la kongresa kajero pri la diskuttemoj kaj la elstaraj referantoj, kiaj Renato Corsetti, Vincent Charlot, Dante Chierico, Andrea Chiti-Batelli, Giancarlo Fighiera, Giuseppe Grattapaglia, Mauro Nervi, Sean O' Riain, Anna Löwenstein, Humphrey Tonkin... Notindas la kunsido kun reprezentantoj de la Itala Federacio pri Unesko kaj la Ronda Tablo, kies diskuttemo altiris multajn personojn, ankaŭ neesperantistajn. Krome okazis

*Diris pri Esperanto S. PIO X (Papo Sarto)  
Esperanto havas antaŭ si grandiozan estontecon.*

Ĝenerala Asembleo de IEF kun elekto de nova Estraro, kaj kunvenoj de diversaj fakasocioj: ILEI, IIE, EEU k.a.

Eksterkongreseje okazis ĉiutage, en Triesto kaj ties ĉirkaŭaĵoj, vizitoj kaj promenadoj; en nia regiono, post la kongresa fermo, duontaga kaj tuttaga ekskursoj: ĉio ĉi postulis la engaĝiĝon de pluraj TEA-anoj, kiuj improvize - sed tre sukcese! - rolis kiel ĉiĉeronoj. Laŭdindaj tamen ankaŭ la kongresanoj kiuj brave eltenis la sufokan varmon kaj la frapantan sunon, entuziasme sekvantaj la klarigojn de la gvidintoj.

Trie, pri la interkona vespero: ĝi ebligis pli fruan konatiĝon inter kongresanoj kaj Triesto, ol inter kongresanoj mem. Ties scenejo estis la Muzeo pri la Maro. Ĉi malkutima maniero komenci kongreson iom surprizis la alvenintojn, tamen ne tiom ŝoke, ĉar la plejmulto ŝajnis kontenta pri tiu novaĵo.

Kaj fine, pri la teatraj vesperoj. Kio plej frapis, estis la preskaŭ neeltenebla varmo de la teatra salono! Malgraŭ tio tamen ĝi ne malpleniĝis dum la lunda kaj marda spektakloj, ne ĉiuj forfuĝis serĉante pli freŝan aeron: la plejmulto restis sidanta en tiu forno. El ĉio ĉi ni povas eltiri la sekvajn konkludojn: ke la prezentadoj estis kaj interesaj kaj spektindaj kaj ke valoris la peno iom suferi! Mi subaŭskultis kelkajn komentojn: EL NIA KULTURA PASINTECO estis la plej aprecita spektaklo. Dum ĝi sin prezentis ASOCIO 13 FAMILIOJ, kun kantoj el Mezepoko, la DANCANTOJ DE LUCINICO, friula grupo kiu elstare muzikadis, kantadis kaj kirlle dancadis, kaj la Virina Slovena Koruso IVAN GRBEC, kiu kantis slovene kaj Esperante.

Certe ĉi tiu konciza resumo tute supraĵe priskribas la tutan okazaĵon: pli bone estus aŭdi la pensojn de tiu kiu ĝin ĝuis (aŭ malĝuis) kiel ordinara kongresano, kaj ne kiel engaĝito en ties organizado. Do, nun estas via vico: mi atendas viajn kritikojn, viajn opiniojn, viajn juĝojn pri la 70<sup>a</sup> Itala Kongreso de Esperanto, la unua itala kongreso de la 3<sup>a</sup> jarmilo!

## Premio Capestrano 2001

En la jaro 1934 kamparano, elfosante vitejon ĉe la vilaĝo de *Capestrano*, trovis statuon altan pli ol 2 metrojn el la 6<sup>a</sup> jc a.K., perfekte konservita; ĝi reprezentis tiaman soldaton kun siaj armiloj. Nuntempe ĝi troviĝas en la Nacia Arkeologia Muzeo de Regiono *Abruzzi*.

Okaze de la itala kongreso en Pineto (1993), la Regiona Prezidinto volis premii la homon kiu, dum tiu jaro, plej kontribuis al solvo de monda interkompreniĝo: post tiam, la premio estis plue aljuĝita al diversaj eminentuloj.

Estante komence de nova jarmilo, kaj por pli bone solenigi la eventon kaj doni pli fortan instigon al "NIA" komuna afero, la speciala Komisiono, sub la influo de pluraj Aŭtoritatuloj de tiu Regiono, decidis aljuĝi du premiojn samjare.

La unua iris al la memoro de Stanjo CHRDLLOVA kaj estis solene transdonita al la edzo en Zagrebo dum la Universala Kongreso; la dua estis transdonita, la 31<sup>ma</sup> de julio, dum la Itala Kongreso, al Michela LIPARI pro:

- ⇒ longdaŭra sencesa aktivado por disvastigo de Esperanto kaj de ĝiaj interkomprenigaj idealoj;
- ⇒ la grandaj klopodoj maleŭropigi kaj tutmondigi UEA-n per kuraĝigo kaj subteno de iniciatoj en diversaj mondopartoj;

⇒ preskaŭ dekjara engaĝiĝo en la plej supera organo de nia movado, ofte kun grandaj emocio kaj streĉiĝo.

*Michela Lipari esperantiĝis en la jaro 1966. Profesie estas ŝtatfunkciulo ĉe la Kontrol-Kortumo, specialisto pri laŭleĝeco de la dekretumado far' Ministerio pri financoj. De tiu jaro ŝi aktivis en pluraj fakoj de la Esperanto-movado: iama estrarano de Itala Esperanto-Junularo, de Itala Esperanto-Federacio kaj komitatano de TEJO, estrarano de CoEdEs, itala eldon-kooperativo. De 1979 senĉese partoprenas en la Komitato de UEA kaj de 1992 ĝis hodiaŭ estas membro de ties estraro. En tiu ĉi medio ŝi laboris kiel respondeculo pri kultura agado, kiel ĝenerala sekretario kaj post la UK en Zagrebo okupiĝos pri Landa agado ĝis la jaro 2004.*

## Nova Fei-Estraro

Dum la Ĝenerala Asembleo estis voĉdone elektitaj la jenaj personoj:

Prezidanto: Aldo GRASSINI

Vic-prezidanto: Michela LIPARI

Ĝenerala Sekretario: Laura BRAZZABENI

Kasisto: Gianfranco POLERANI

Konsilantoj: Giordano FORMIZZI, Alessandro SARNO, Alessandro SIMONINI

Ĉi tiu mallonga inform-resumo pri nia kongreso atingusian finon per la vortoj eldiritaj de la ASOCIO 13 FAMILIOJ, bonvenigaj kaj bonakceptaj vortoj al tiuj homoj, kies unu el la precipaj celoj estas kunigi ĉiujn popolojn per komuna lingvaĵo.

*El intaj tempoj, el tiuj foraj de l' Babel' infera, homoj ne plu sin komprenas unu la alian, ĉar Fato volis ke ĉiu parolu lingvaĵon propran.*

*Romo, la Eterna, agis por ke en impero sia ĉiuj gentoj sin esprimu per nura lingvo ĝia, sed poste la hordoj de barbaroj sovaĝaj mise nebuligis ĉiujn mensojn.*

*Akceptu do, ni, plej ĝoje la parolon de tiuj kiuj strebas por ke homoj ĉiulande rilatu inter si per unu idiomu sola. Kaj kun ili, dispecigu ni la panon, simbolon de l' frata konsento, kaj disdonu ni la vinon de niaj vitejoj, kiu ekflagru en ĉoroj niaj la ĝojan fajron pri l' kunesto. Ĉin ĉin Ĉinĉut!*

*Ke aboco via, trairu la mondon per pacaj vortflugiloj.*

## Pri la 86<sup>a</sup> UK

*Mesaĝo de d-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof*

Mi salutas Vin tutkore, venintajn el tre diversaj landoj de la terglobo al tiu ĉi bela urbo Zagrebo, la ĉefurbo de Kroatio, sed ankaŭ, dum la semajno komenciĝanta, la ĉefurbo de Esperantujo. Ni observu, ke nia kongreso okazas unuafoje en la tria jarmilo de la kalendaro, sed ankaŭ unuafoje, laŭ la sama kalendaro, en la tria jarcento de Esperanto.

Vi venis diskuti pri dialogo inter kulturoj, kies bezono iam ja inspiris la iniciaton de la Lingvo Internacia. Fakte, preskaŭ ĉiuj biografoj de Zamenhof mencias la legendon, laŭ kiu la juna Ludoviĉo, vivanta en la tiam multkultura

urbo Bialistok, observis malamon regantan inter la diversnaciaĵoj, ne trovantaj lingvon komune kompreneblan, ilon laŭ Li necesan al la dialogo inter iliaj kulturoj respektivaj.

La multnombro de kulturoj, ilia granda diverseco, prezentas unu el la plej valoraj riĉaĵoj de la Homaro. La dialogo inter ili permesas kompreni, permesas estimi, respekti kulturojn malsamajn. Sen tia dialogo, sen tia kompreno, kulturo fremda aperas stranga, aperas malamika, inspiras malestimon, disdegnon, malamon. Ja en multaj lingvoj naciaj la vortoj "fremda" kaj "stranga" posedas la saman radikon: *strange* en la angla kaj *e'trange* en la franca signifas "strangan", dum *stranger* kaj *e'tranger* signifas "fremdulon"; tiel do homon venantan de stranga lando, personon elvokantan ian strangan kulturon...

Tamen la dialogo inter kulturoj devas sekvi sian kulturon propran: la kulturon de dialogo. Kulturon, kiu implicas egalecon de la dialogantoj, zorgantaj eviti altrudadon de siaj respektivaj pensmanieroj, de siaj respektivaj kulturoj, zorgantaj respekti kulturon de la alia, eĉ tiun de plej eta komunumo. La menciitaj kondiĉoj de kulturo de dialogo povas esti strikte observataj dank' al la Lingvo Neŭtrala. Belan ekzemplon de la kulturo de dialogo prezentas ja la Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Pardonu al mi, Geamikoj, la ripetadon de veraĵoj konataj de Vi ĉiuj. Pardonu tiun restaĵon devenantan de mia profesora kariero, dum kiu mi kutimis observi ke la plej ŝatataj de ĉiuj miaj prelegoj estis tiuj, kiuj rilatis ĝuste al la temoj plej bone konataj de la aŭskultantoj. Krome mi kaptas la okazon al mi donitan, por ripeti antaŭ Vi la ideojn de mia Antaŭulo, kiuj, prononcataj dum pli ol cent jaroj, daŭre aperas aktualaj.

Hodiaŭ al Vi, Granda Zamenhofa Familio, alfalas la tasko debati pri la plej trafa adapto de tiuj ideoj al la kondiĉoj de la tria jarmilo. Mi ne dubas, ke viaj debatoj, dokte kaj sperte de Humphrey Tonkin gvidotaj, estiĝos interesaj kaj fruktodonaj.

## Raporto pri la Universalaj Kongresoj

de Zagrebo

De Garik Kokolija

La plej grava rezulto de komitata laboro estis ĉi-jare elekto de nova UEA-estraro, kiu same funkcios dum tri proksimaj jaroj. La nova **Prezidanto** de UEA iĝis Renato Corsetti (Italio); **Vicprezidantoj**: Lee Chong-Yeong (Korea Resp.) kaj Humphrey Tonkin (Usono); **Ĝenerala sekretario**: Ivo Osibov (Kroatio); **Estraranoj**: Ans Bakker (Nederlando), Gbeglo Koffi (Togolando), Michela Lipari (Italio) kaj Andrej Grigorjevskij (Rusio - unuafoje ruso estis elektita UEA-estraro).

Inter aliaj decidoj de la komitato menciindas la altigo de baza membrotizo al 50 eŭroj.

En ĉefa kongresejo, dum la unua tago, registriĝis la alvenintaj kongresanoj (entute aliĝis al la Kongreso ĉ. 1700 personoj), ekfunkciis la Libroservo (abunda kaj impona kiel ĉiam dum UK), pasis ankaŭ kolektiĝo kaj foriro per busoj de la partoprenantoj de Infana Kongreseto, kiu estis ĉi-jare rekorde granda, ĉar en ĝi partoprenis 56 infanoj. Samvespere en la placeto apud la kongresejo okazis la interkona vespero, dum kiu muzikis kroataj kant- kaj danc-ensembloj.

Dimanĉe, la 22<sup>am</sup>, je la 10<sup>a</sup> horo la solena inaŭguro, dum kiu salutparolis la prezidento de Kroatio, Stjepan

Mesic. Tiuvespere, en unu el la placoj de Zagrebo, estis inaŭgurita la monumento "Futuro" de dana skulptisto Jesper Neergaard, de li donacita al Zagrebo lige al la 86<sup>a</sup> UK: temas pri iom abstrakta skulptaĵo, sur kiu aperas la jena teksto: "Esperanto – por monda komunikado en paco kaj libereco 2001".

La taga programo dum la Kongreso pasis kutime multnombro, senĉese kaj paralele: kursoj, kunvenoj, prelegoj, prezentoj, diskuttrondoj, seminarioj, dokumentaj filmoj, diservo, aŭtoraj duonhoraj, Kongresa Universitato, fondaĵoj, akceptoj, babiloj en koridoroj kaj manĝejoj, kaj multo alia.

Inter la kulturaj kaj distraj aranĝoj, aparte menciindas la du koncertoj de Georgo Handzlik, tiuj, en la kongresa vestiblo kaj urba kafejo, de la ensemblo ESPERANTO-DESPERADO sub gvido de Kim Henriksen, kaj la koncerto de Andrej Korobejnikov, tie titolita "la juna Mozart el Rusio". Sekvis nacia vespero, kongresa balo en centra placo de Zagrebo kun multaj spektantaj kaj partoprenantaj zagrebanoj, la brila teatraĵo "La plej longa tago en la vivo de Maria Theresia" ĉe Kroata Naci-Teatro kun neforgesebla Vida Jerman ĉefrole.

Ĉefa novaĵo de lastaj kongresaj tagoj sendube estis du demisioj, okazantaj en februaro 2002: pri ili anoncis Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller kaj Direktoro de Centra Oficejo Pasquale Zapelli. Ĉiuj ege bedaŭris pri tio konsciente, ke tiuj demisioj signifas grandan perdon por UEA.

Sekvajare Universalaj Kongresoj okazos en Fortaleza (Brazilo), 3-10 aŭgusto 2002; en 2003, en Gotenburgo (Svedio), 26 julio-2 aŭgusto. Pri la kongresurbo por 2004 la nova UEA-estraro intencas decidi ĉi-aŭtune: kandidatas Pekino (Ĉinio) kaj Vilnius (Litovio).



## Librokatalogo de UEA: Montrofenestro de la Esperanto-Kulturo

La impona nombro de 4387 titoloj troviĝas en la ĵus aperinta 189-paĝa katalogo de la Libroservo de UEA. Pli ol 4100 el ili estas libroj, dum la resto konsistas el diskoj, kasedoj, vidbendoj, insignoj k.a. varoj.

La nova katalogo, titolita simple "Esperanto-katalogo" kaj eldonita en 7500 ekzempleroj, havas 40% pli da titoloj ol la antaŭa, aperinta en 1994, kiu havis 3150 erojn. Ĝi ne estas nura prezlisto, sed la varoj estas koncize priskribitaj, krom se la titolo mem estas sufiĉe priskriba. La katalogo estas dividita en 32 fakojn. Ĝian uzon plifaciligas ankaŭ indekso de la aŭtoroj, entute 375, kiuj estas reprezentataj per pluraj titoloj. Al la informo valoro kontribuas ankaŭ multaj reklamoj de Esperanto-eldonejoj.

Plenkolora kovrila foto pri la libroserva butikoj en la Centra Oficejo faras el la katalogo tre allogan eldonaĵon, kiu certe ne povos manki en iu ajn ekspozicio pri Esperanto. Apud la Jarlibro de UEA kaj la adresaro de Pasporta Servo de TEJO, ĝi montras la vivantecon de Esperanto kaj ĝia movado.

La katalogo estas sendita senpage al la dumvivaj membroj kaj delegitoj de UEA, al la klientoj de la Libroservo kaj al la Membroj-Abonantoj en pagipovaj landoj. Poste ĝin ricevos ankaŭ tiuj, kiuj ankoraŭ ĉi-jare aliĝos al UEA en la kategorio Membro-Abonanto, kaj la novaj klientoj.

Eblas ankaŭ aĉeti la katalogon. Ĝia prezo estas 4,50 eŭroj (plus afranko kaj, por EU-civitanoj, imposto de 6%). Se oni samtempe aĉetas minimume tri ekzemplerojn, la prezo estas 3,00 eŭroj. Tiuj kiuj pagas la plenan prezon de 4,50 eŭroj, ricevos ĝin (escepte de sendokostoj) lige kun sia unua mendo ĉe la Libroservo de UEA. Tiu favoraĵo validos tri monatojn ekde la aĉeto de la katalogo.



## Novajoj pri ILEI

Dum la 35<sup>a</sup> ILEI-Konferenco, okazinta en Lovran, Kroatio (28/07-04/08/01), la Komitato elektis la novan estraron por

trijara periodo. Jen la rezultoj:

**Prezidanto** - Mauro La Torre - kunordigado de la asocia laboro kaj rilatoj de ILEI kun Esperanto-organizo, unuavice kun UEA.

**Vic-prezidanto** - Stefan MacGill - eldona agado.

**Sekretario** - Agneta Emanuelsson - membraro, landaj asocioj kaj ekzamenoj.

**Kasisto** - Boomee Kim Lindblom.

**Help-sekretario** - Sabine Trenner - rilatoj kun lernejoj, trejnado, junularaj aranĝoj.

**Estrarano** - Jennifer Bishop - pri konferencoj kaj por flegi kontakton kun FIPLV (Federacio Internacia de Profesoroj pri Lingvoj Vivantaj).

**Estrarano** - Radojica Petrovic - pri lernejoj projektoj kaj universitata agado.

Dum la Konferenco krome estis akceptita kiel nova sekcio Kroata Esperanto-Ligo.

Notinde grava la membriĝo de ILEI en Federation Internationale de Professeurs des Langues Vivantes (FIPLV).

## Ekologie turismi en Brazilo

La temo de la 87<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto en Fortaleza pritraktos la ekologian turismon, ĉar la jaro 2002 estis deklarita la Internacia Jaro de Ekologia Turismo.

La vortumo de la Fortaleza temo tekstas "Diverseco: ŝanco, ne minaco". Per tio la Estraro de UEA akcentas la neceson kompreni la ekologian turismon pli vaste ol nur en rilato al la naturo. Same necesa kiel konservo de la natura diverseco estas tiu de kultura diverseco. Fundamenta aspekto de la kultura diverseco estas la diverseco de lingvoj.



Dimanĉon la 9<sup>an</sup> de septembro

Festo de Amikeco

ĉe Dreiländerecke

Geomikoj el la tri najbaraj landoj atendas vin sur montopinto de *Monte Forno*, por gaja kunestado kaj reala atestado, ke homoj pace deziras kunvivi, ignorante ĉian ajn diferencon pri raso, etnio, religio, politika kredo, lingvo, kulturo ks.

Triesta esperantistaro, kune kun Martin Stuppniĝ, atentos vin ĉe la telfera stacio apud Arnoldstein, ekde la 9<sup>a</sup> horo! Ne forgesu vian Alp-Adrian T-ĉemizon kaj - ĉefe - komfortajn ŝuojn!

Sinanoncojn por kuna forvojaĝo atendas TEA-sekretario, telefono - 040 763128 (marde kaj vendrede - 19.30-22.00) aŭ rete - [testudo@adriacom.it](mailto:testudo@adriacom.it)

## Universitata E-grupo serĉas kontaktojn

Enkonduka E-kurso atingas la lastajn lecionojn ĉe la universitato en Lausanne (Svislando) kaj la kursanoj ekplanadas la daŭrigon perletere. Oni serĉas universitatajn aŭ aliajn E-grupojn aŭ individuojn kiuj ŝatus aktive kontakti kun la studentoj.

[ethno-culture@worldonline.ch](mailto:ethno-culture@worldonline.ch)

## Oni bezonas instruiston

Pro finiĝo de kontrakto kun antaŭa lingvoinstruisto, la estro de japana entrepreno kun filioj en Ekstrem-Oriento serĉas kvalifikitan instruiston de Esperanto kaj de la angla. Salajro: 150 000 enoj monate (1.250 \$). Flugbileto Eŭropo - Japanio ambaŭdirekte pagota. Ebleco loĝi senpage en apartamento de la kompanio (luprezo egalvalora al 15 000 enoj monate).

Por detaloj kontaktu: Etsuo Miyoshi

[e.miyoshi@swany.co.jp](mailto:e.miyoshi@swany.co.jp)

## ESPERANTO@INTERRETO

La venonta TEJO-seminario Esperanto@Interreto, kiu okazas inter 27.10-04.11.2001 en Stokholmo (Svedio) havos la temojn:

**Retregado** - la bazaj scioj kiujn oni bezonas por povi uzi/regi la reton (serĉi, publikigi, prezent-strukturoj, grafikado, HTML, unikodo, bazaj scioj pri kiel funkcias Interreto teknike kaj socie).

**Retkunlaboro** - kiel oni povas kunlabori pere de la reto (retpoŝtlistoj, icq, irc, publikfontaneco, kiel TEJO povas uzi la reton plej bone).

**Retprogramado** - teknikoj por povi fari programojn funkciajn en la reto (CGI, ASP, JSP, PHP, Python, JS, formularoj, SQL, labormetodoj en retprojekto).

Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe: Hokan Lundberg

**Rete:** [hokan.lundberg@home.se](mailto:hokan.lundberg@home.se)

## Vortaro: Esperanto - Brazil-Portugala

Antaŭ nelonge aperis "ALLS vortaro" Esperanto - Brazil-Portugala kaj Brazil-Portugala - Esperanto. Ĝi estas ĉiesaĵo kaj enhavas proksimume 18 mil vortojn, inter ili pluraj dirmanieroj kaj komunaj frazoj. Oni povas ekhavi pluajn informojn, nome, kiel ĝi funkcias, bildoj de la ekranaj, instrukcioj por instalo kaj elŝuto de "ALLS Vortaro" el la retpaĝaro de Pinarbara Esperanto-Grupo, ĉe: <http://www.rantac.com.br/users/all>.

Antonio Luis Lourenco dos Santos

**Rete:** [alls@dglnet.com.br](mailto:alls@dglnet.com.br)



Radio Havana ĉi jare festas sian 40-jariĝon. Oni petas sendi retmesaĝojn okaze de ĉi festo kaj de la 12-jariĝo de Esperanto-elsendoj ĉe la stacio.

La retadreso estas: [rhc@ip.etecsa.cu](mailto:rhc@ip.etecsa.cu)

*Kelkaj artikoloj aperintaj en la Bulteno fontas el:*

*RET-INFO kaj NOVA SENTO*

**BULTENO** de la membroj de

**TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO**

**Sidejo:** Via Crispi 43 - 34125 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128

Reto: [esperantotrieste@adriacom.it](mailto:esperantotrieste@adriacom.it); [nored@tiscalinet.it](mailto:nored@tiscalinet.it)

**Poŝta adreso:** CP 601 - IT-34100 Trieste Centro-Italio

Postĉekkonto N° 10834349